



# TEA-BULTENO

2ª JARO NOVEMBRO 1999 NUMERO 11



## AGENDO



1 L

2 M Ordigo de TEA-arkivo

3 M

4 *Ĵ **Ljubljana**: Memore al niaj mortintaj geanoj

5 V Ludkarta vespero: TRISEPO

6 S

7 D

8 L



9 M Ordigo de TEA-arkivo

10 M

11 *Ĵ **Ljubljana**: Novaĵoj el Esperanto-gazetoj

12 V Gramatikaj kaptiloj: la vortoj «ridi» kaj «trans»

13 S

14 D

15 L



16 M Ordigo de TEA-arkivo

17 M

18 *Ĵ **Ljubljana**: Lingva vespero




19 V Oni tiel skribis en 1933

20 S

21 D


22 L



23 M Ordigo de TEA-arkivo

24 M

25 *Ĵ **Ljubljana**: Diapozitivoj pri Adriaj urboj



26 V Nia bela mondo en diapozitivoj

27 S Malferma Tago ĉe UEA en Roterdamo

28 D

29 L



30 M Ordigo de TEA-arkivo

*La programoj ĉe E-Turisma Societo Ljubljana ekas je la 19.30.

## ALP-ADRIA ESPERANTO-KONFERENCO Pula 7-10.10.1999

### Temo: Kulturaj Rajtoj de etnaj malplimultoj en Alp-Adria Laborkomunumo

Pro la abundo de konferencoj/kongresoj/seminarioj en nia Esperantujo, estas preskaŭ normale ke la plej etaj, ĉefe interregionaj, renkontiĝoj ne estas tiel amase vizitataj. Kaj io tia okazis laste al nia 11ª Alp-Adria rendevuo: jes, malmulta partoprenantaro por tiel altkvalita konferenco. Altkvalita pro la interesa programo, pro la temo kiu estis vaste diskutita en diversaj okazoj, pro ties malfermo al la ekstera publiko, pro la ĝuitaj ekskursoj, pro la sendube elstara organizado, zorgita de Marija Beloŝevic kune kun eta nombro de viglaj helpantinoj.

Tute ne flatintence, mi tion diras – ja, inter ni tio absolute absurdas – simple temas pri la vera vero. Je la malfermo, kiu ĝenerale signifas nur longan sinsekvon da salutoj, dankvortoj, komplimentoj, sinceraj kaj malsinceraj laŭdoj ktp ktp, tuj evidentiĝis ke ĝi estos escepto kompare kun niaj tradiciaj kutimoj.

La temo estis, tuj je la komenco, debatita danke al la ĉeesto de reprezentanto de la makedona minoritato en Pula, kiu - skize kaj koncize - prezentis enkondukan bildon pri la vivo de tiu grupo en Istrio. Sed al tio sekvis longa vico da demandoj, interŝanĝoj de opinioj, kaj pluraj aliaj interesovekaj intervenoj. Do, mi bedaŭras pro la malmulta partopreno de la Alp-Adria esperantistaro, sed eĉ pli bedaŭras pro la fakto, ke ili maltrafis okazon por pliriĉiĝi, mense kaj spirite, ĝuste pri temoj tiel rekte tuŝantaj nian komunan agadon. Kaj mi finu ĉi mallongan raporton per la parolado de la Sekretario de Alp-Adriaj Konferencoj, Edvige Ackermann.

✪ ✪ ✪ ✪ ✪ ✪ ✪ ✪

Ekde la 19ª jarcento, etna toleremo estis anstataŭigita per unuetna koncepto pri nacio-ŝtato, malgraŭ ke etna homogeneco estis escepto, kaj ne la kutimo, en la tiamaj eŭropaj ŝtatoj. En Eŭropo, 750 milionoj da loĝantoj vivas en areo de la Atlantika Oceano ĝis la Uralaj Montoj, sed la etna kaj kultura realo ne kongruas kun la politika organizo de ĝiaj ŝtatoj.

Troviĝas 70 diversaj popoloj en Eŭropo, mult- kaj malmult-nombraj, sed nur 36 ŝtatoj kun pli ol unu miliono da enloĝantoj. Tio signifas, ke oni havas pli da popoloj (praktike la duoblon) ol da ŝtatoj.

La plej granda parto el ili estis strukturitaj kiel ununaciaj ŝtatoj kun etnie nereala homogena loĝantaro. La principo de etna ekskluziveco en ununacia ŝtato dividis eŭropanojn en du kontraŭstarantajn kategoriojn: kelkaj naciaj majoritatoj en reganta pozicio kaj multnombraj

naciaj minoritatoj submetitaj al la bona volo de la regantoj. Tiamaniere la naciaj konfliktoj leviĝis kaj la konsekvencoj estis la dua mondmilito kaj multaj aliaj militoj pro etnaj problemoj.

Post grandaj ŝanĝoj en Eŭropo en la jaroj 1989/90, la nesolvita problemo pri naciaj minoritatoj denove akre prezentiĝis. Kelkaj ŝtatoj ne plu ekzistis kaj el ili naskiĝis novaj. La etnaj problemoj ofte estas diskutataj perforte kaj la rezultoj estas pluaj mortoj kaj detruoj, pluaj amasoj da rifuĝintoj, pluaj malfacile kontroleblaj situacioj.

Nun, pli ol 50 jarojn post la subskribo de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, la unuetna koncepto pri nacio-ŝtato estas anstataŭigita per koncepto de multetna aŭ plurnacia ŝtato, en kiu kunvivado inter nacia majoritato kaj unu aŭ pli naciaj minoritatoj okazu surbaze de kunlaborado kadre de homaj rajtoj, demokratio kaj juro.

Tiu ĉi solvo estas urĝe postulita kaj ebla nur pere de moderna protekto de etnaj grupoj konforme al la teritoria konsisto de la ekzistantaj ŝtatoj.

Sed ni prikonsideru kelkajn ciferojn.

En Eŭropo troviĝas 36 ŝtatoj kiuj havas pli ol unu milionon da loĝantoj, sed nur unu inter ili - Portugalio - ŝajne ne havas problemojn pri minoritatoj. Restas do 35.

En 5, etnaj konfliktoj estis, aŭ estas, solvitaj pere de perforto (Bosnio-Hercegovino, Jugoslavio, Kroatio, Rusio, Turkio). Restas 30 ŝtatoj.

Pliaj 7 havas, aŭ havis antaŭ nelonge, solvendajn etnajn konfliktojn kun najbaraj landoj (Albanio, Bulgario, Grekio, Estonio, Latvio, Makedonio kaj Ukrainio). Restas 23.

En aliaj 5 estas, aŭ estis antaŭ nelonge, etnaj problemoj (Granda Britio, Moldavio, Rumanio, Slovakio, Hispanio).

Restas, do, 18 ŝtatoj (preskaŭ la duono) en kiuj troviĝas etnaj problemoj sed ne en tro grava formo aŭ en danĝera situacio.

El tio oni povas kompreni, ke tamen risko pri konfliktoj estas reala kaj pligrandiĝas kaze de maladekvata aŭ nula jura protekto.

Eŭropa Konsilio ellaboris por la Eŭropa Komunumo kvar dokumentojn por disvolviĝo de taŭga protektosistemo: ĉarton pri regionaj aŭ minoritataj lingvoj, rezolucion pri protekto de naciaj minoritatoj, pluan protokolon pri homaj rajtoj kaj specifan dokumenton pri aŭtonomiaj rajtoj de la etnaj eŭropaj grupoj. Ne ĉio iras glate, sed almenaŭ oni klopodas, inter multaj malfacilaĵoj, starigi komunan justan sintenon.

Ni, Alp-Adrianoj, troviĝas ĉiam mergitaj en tiaj problemoj, kiuj kaŭzis – kaj plu kaŭzas – al niaj popoloj grandajn suferojn kaj terurajn travivaĵojn. Por resanigi la vundojn oni bezonas tempon, ĉiesflankan bonvolon, komprenemon, toleremon.

Mi kuraĝas diri ke ni esperantistoj de Alp-Adrio kontribuis iamaniere al forigo aŭ mildigo de tiaj konfliktoj, kunlaborado ĉiam floris, interkomunikado bone funkciis eĉ en malfacilaj tempoj. Oni povus demandi kial inter ni ĉio pli bone funkciis, pli glate, pli solidare.

Nia komuna lingvo certe helpis nin: uzante ĝin, ĉiu fordonis ion por favori interkompreniĝon, kaj la ideoj al ĝi ligitaj plifaciligis la tuton. Ideoj, idealoj de nia Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto, kiu sindediĉis al mondo libera je iu ajn diskriminacio, precipe lingva diskriminacio, ideoj kiuj estas resumitaj en versoj bone konataj de ni ĉiuj:

*sur neŭtrala lingva fundamento,*
*komprenante unu la alian,*
*la popoloj faros en konsento*
*unu grandan rondon familian.*

Pri la kompreno sur neŭtrala lingva fundamento, ĉio en ordo, tion ni bone realigis, sen tro granda peno. Mi ne scias, ĉu ni, en Alp-Adria regiono, sukcesis realigi unu grandan rondon familian.

Sed mi certas ke almenaŭ malgrandan, jes, ni sukcesis. Kaj niaj pluraj kontaktoj dumjare kaj precipe nia ĉeesto ĉi-tie en Pula, iama aŭstro-hungara, itala, nune kroata, klare pruvas tion. Spite al ĉio!

## La $27^{an}$ de novembro: Malferma Tago en Rotterdam ĉe UEA



Prof. **Humphrey Tonkin** gastos en la $11^{a}$ Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la $27^{an}$ de novembro. Estos do, okazo aŭdi la pensojn de tiu movada gvidanto kiu, dum la pasintaj jardekoj, plej elstare markis la historion de nia ĉefinstanco.

Sojle de la Malferma Tago pluraj novaj libroj aperos: unu el ili sendube furoros dum la Tago kaj ankoraŭ longe poste. Temas pri **Hejma vortaro**, kiu registras E-vortojn de hejmaj aĵoj kaj agoj, kun traduko en 13 lingvoj. Tiutage ĝia redaktoro, prof. Jouko Lindstedt, prezentos la verkon, kiun la vizitantoj povos aĉeti kun 10-procenta rabato, same kiel ĉiujn aliajn varojn de la libroservo. Ankaŭ ĉi-foje ne mankos senpaga loterio, bazaro de Esperantaĵoj kaj montrado de vidbendoj. Kafo kaj teo varmos de la $10^{a}$ ĝis la $17^{a}$ horo. Elkoran Bonvenon!

## SEMINARIO EN MODENA 4 - 5 DECEMBRO 1999

### *Temo - Metodoj kaj instrumentoj por instruado de la internacia lingvo en Italio*

Organizita de **Itala Esperanto-Federacio** kaj Laura Brazzabeni <lbrazza@iol.it>; taŭga por ĉiu esperantisto, precipe por instruantoj kaj instruistoj, la Seminario komenciĝos sabaton je la 14.30 h. per pritemaj intervenoj de prof-roj Giordano Formizzi kaj Renato Corsetti. La postan matenon sekvos prezentado de broŝuro pri lernolibroj, fare de prof. Laura Brazzabeni, kaj labor-grupoj pri la temo, dum, posttagmeze, asembleo de **Itala Esperanto-Instituto**, kun balotado.

Seminariejo, funkcianta ankaŭ kiel tranoktejo kaj manĝejo: ***Hotel Europa - Corso Vittorio Emanuele II, 52 - Modena*** (ĉe la fervoja stacidomo) - tel 059-217721.

Pliaj detalaj informoj kaj aliĝoj ĉe: **Fei** - 02-58100857 (marde kaj ĵaŭde); Laura Brazzabeni - 0376-926099 (vespere); 0339-1522925 (posttagmeze); Tea-sekretario - 040-763128 (marde kaj vendrede).

**Bulteno** de la membroj de
**Triesta Esperanto-Asocio**
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# NOVEMBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | 1<br>Festo de Ĉiuj Sanktuloj | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Mardo | 2<br>Memortago de Ĉiuj Mortintoj | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Merkredo | 3 | 10 | 17 | 24 | |
| Ĵaŭdo | 4 | 11 | 18 | 25 | |
| Vendredo | 5 | 12 | 19 | 26 | |
| Sabato | 6 | 13 | 20<br>Internacia tago de Infanaj Rajtoj | 17 | |
| Dimanĉo | 7<br>Diwali | 14 | 21 | 28 | |


# NOVEMBRO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | 1<br>Festo de Ĉiuj Sanktuloj | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Mardo | 2<br>Memortago de Ĉiuj Mortintoj | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Merkredo | 3 | 10 | 17 | 24 | |
| Ĵaŭdo | 4 | 11 | 18 | 25 | |
| Vendredo | 5 | 12 | 19 | 26 | |
| Sabato | 6 | 13 | 20<br>Internacia tago de Infanaj Rajtoj | 17 | |
| Dimanĉo | 7<br>Diwali | 14 | 21 | 28 | |

## 5760 Hebrea jaro

## 2559 Budhista Jaro

## 2055 Hinduisma jaro

7 - **Diwali**. Tiu vorto signifas «Vico de lumoj» aŭ «Lampoj el terakoto». Dum tiu festotago en ĉiuj vilaĝoj kaj urboj, miloj kaj miloj da oleaj aŭ elektraj lampetoj lumigas la domojn, la publikajn palacojn kaj la vendejojn. Ĉiujn pordojn oni malfermadas por allogi *Lakshmi*, diinon de prospero kaj bonŝanco, kun la espero ke ŝi eniru kunportante siajn donacojn. Temas pri festo tre gaja kaj senzorga, dum kiu oni briligas buntajn artfajraĵojn. Ekde tiu tago komenciĝas la nova financa jaro.

## 1999 Kristana jaro

1 - **Festo de ĉiuj Sanktuloj (Anglikana, Katolika)**. En tiu ĉi tago oni rememoras ĉiujn Sanktulojn, kiuj estu ekzemplo-donaj kaj sekvinda modelo por ĉiuj kredantoj. Al Ili estas direktataj la preĝoj, por ke Ili propetu ĉe Dio pro la pekantoj.
2 - **Memortago de ĉiuj Mortintoj (anglikana, Katolika).** Tiutage la familioj iras tombejen, por honori la memoron de propraj mortintoj, alportante florojn kaj lumetojn por ornami la tombojn.

## 1420 Islama jaro

---

20 - **Internacia Festo de infanaj rajtoj.** En 1989 estis aprobita de Unuiĝintaj Nacioj la Internacia Konvencio pri Rajtoj de Infanaro, en kiu estas proklamite, ke infanoj kaj knaboj rajtas je ĉiaj specialaj rimedoj pri protektado kaj prizorgado. Estis sankciitaj pluraj rajtoj, inter kiuj:
- vivebleco kiel eble plej sekura kaj komforta,
- dignaj evolu-kondiĉoj,
- ebleco ĝui ĉiujn disponeblajn rimedojn.

Krom la esencaj rajtoj, oni atribuis elstaran gravecon al tiuj pri edukado en la respekto de homa digneco de la infano kaj ties rajto je ripozo, amuziĝo, ludado kaj ĉiuj distraj aktivaĵoj propraj de la infanaĝo. Plie, se temas pri infanoj apartenantaj al iu ajn minoritato, tiuj ne devas esti senigitaj je rajto de propra kultura vivo, konfesi aŭ kultobservi propran religion, aŭ paroli propran lingvon kun la aliaj membroj de sia grupo.

## 5760 Hebrea jaro

## 2559 Budhista Jaro

## 2055 Hinduisma jaro

7 - **Diwali**. Tiu vorto signifas «Vico de lumoj» aŭ «Lampoj el terakoto». Dum tiu festotago en ĉiuj vilaĝoj kaj urboj, miloj kaj miloj da oleaj aŭ elektraj lampetoj lumigas la domojn, la publikajn palacojn kaj la vendejojn. Ĉiujn pordojn oni malfermadas por allogi *Lakshmi*, diinon de prospero kaj bonŝanco, kun la espero ke ŝi eniru kunportante siajn donacojn. Temas pri festo tre gaja kaj senzorga, dum kiu oni briligas buntajn artfajraĵojn. Ekde tiu tago komenciĝas la nova financa jaro.

## 1999 Kristana jaro

1 - **Festo de ĉiuj Sanktuloj (Anglikana, Katolika)**. En tiu ĉi tago oni rememoras ĉiujn Sanktulojn, kiuj estu ekzemplo-donaj kaj sekvinda modelo por ĉiuj kredantoj. Al Ili estas direktataj la preĝoj, por ke Ili propetu ĉe Dio pro la pekantoj.
2 - **Memortago de ĉiuj Mortintoj (anglikana, Katolika).** Tiutage la familioj iras tombejen, por honori la memoron de propraj mortintoj, alportante florojn kaj lumetojn por ornami la tombojn.

## 1420 Islama jaro

---

20 - **Internacia Festo de infanaj rajtoj.** En 1989 estis aprobita de Unuiĝintaj Nacioj la Internacia Konvencio pri Rajtoj de Infanaro, en kiu estas proklamite, ke infanoj kaj knaboj rajtas je ĉiaj specialaj rimedoj pri protektado kaj prizorgado. Estis sankciitaj pluraj rajtoj, inter kiuj:
- vivebleco kiel eble plej sekura kaj komforta,
- dignaj evolu-kondiĉoj,
- ebleco ĝui ĉiujn disponeblajn rimedojn.

Krom la esencaj rajtoj, oni atribuis elstaran gravecon al tiuj pri edukado en la respekto de homa digneco de la infano kaj ties rajto je ripozo, amuziĝo, ludado kaj ĉiuj distraj aktivaĵoj propraj de la infanaĝo. Plie, se temas pri infanoj apartenantaj al iu ajn minoritato, tiuj ne devas esti senigitaj je rajto de propra kultura vivo, konfesi aŭ kultobservi propran religion, aŭ paroli propran lingvon kun la aliaj membroj de sia grupo.